

# FLANDRA ESPERANTISTO

MONATIA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA

ESPERANTO

MOVADO

Oficiala Organo  
de

Flandra

Ligo

Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereniging zonder Winstbejag  
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK  
Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51

## EL LA PREZARO:

Per balono al la poluso — Andrée	Fr. 70,—	bind.
Leono de Flandrujo — Conscience	55,—	
Pallieter — Timmermans	43,—	
Pallieter — Timmermans	33,—	broŝ.
Streĉita Kordo — Kalocsay	23,—	»
Ĉirkaŭ la Mondon — Scherer	35,—	»
La Esperanto-Klubo — Malmgren	6,50	»
Printempo en la Aŭtuno — Baghy	14,—	»
Hurah! — Baghy	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	»
Amo kaj Poezio — van Schoor	10,—	»
La du Amatinoj — de Musset	10,—	»
La Infanoj de Betlehem — S. Lagerlöf	5,—	»
La Junulino ei Stormyr — Selma Lagerlöf	12,—	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gosta Berling — Selma Lagerlöf	39,—	»
La Sorĉistino el Kastilio — S. Asch	24,—	»
Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy	14,—	»
Examenopgaven	6,50	»
Dialogoj en Esperanto — E. Dahl	3,75	»
Dialogoj kaj Komedietoj — E. Dahl	3,75	»
Kongreskantaro	3,—	»
Tra la Labirinto de la E. gramatiko (volmakingskursus)	36,—	»
La Konsilanto pri la E. gramatiko (taalontwerpen)	12,50	»
Woordenboekje Biok (1890 stamwoorden)	2,—	»
Leerboek Dirksen, 2 deelen	12,50	»
Konversacia Literaturo (10 illustr. broŝuroj)	10,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witteryck	5,—	»
Literatura Mondo (monata revuo) Jarabono	62,50	»
Groot Woordenboek Van Straaten	70,—	»
Schidlof Zakwoordenboek	22,50	»
Kantaro Esperantista — J. Karnas	6,—	»
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)	15,—	»
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)	10,—	»
Flageto por biciklo	6,—	»
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto	1,50	»

**INSIGNOJ:** Malgranda verda stelo: 1,75 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,25 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 3,50 fr.

**Glumarkoj**, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

**Glumarkoj** « Vredesaktie » po 3 fr. per 100.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

La prezoj ne entenas afrankon.

# Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista  
Aperas ĉiumonate



Redaktoro :  
Juul Karnas  
Van Havere lei, 14  
Deurne-Zuid (Antw.)



Administranto :  
Gerard Debrouwere  
Magdalenastr. 29  
Kortrijk

Jara abonprezo : 20 frankoj. — Eksterlando : 5 belgoj  
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.  
Poŝtĉeko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.



## 1859 D.ro L. L. Zamenhof 1934

Se nia Majstro ne estus mortinta, tiam Li la 15an de decembro estus festinta sian 75an naskiĝtagon. La tuta Esperantistaro sendube estus montrinta sian grandan amon, estimon kaj respekton al Li, kies spirito ankoraŭ ĉiam-vigligas nin por plenumi ĝisfine la taskon: interfratigo de la popoloj per Esperanto.

Fl. Esp.

**Flandra Esperantisto**  
deziras ĉian bonon al ĉiuj  
siaj legantoj kaj kunlaborantoj  
okaze de Novjaro.

## **Feliĉan Novjaron !**

— Feliĉan Novjaron !

Ĉiu hodiaŭ ĝin diras al vi je tiu ĉi eniro en 1935-a. Frumatene jam komenciĝis kun via laktovendistino; poste venis la bakisto, la stratpurigistaro, la noktgardisto, la lanternestingisto, kaj sendube finos kun via leterportisto, kiun vi post unu monato nepre povos ankoraŭ atendi. Ni ne preparolu la pli intimajn bondezirojn, sed konsideru nur la aliajn. Ĉiuj ili estas esprimataj, pli malpli profunde el koro sentataj, laŭ la karaktero de la prezentanto, laŭ lia dummomenta animstato, sed precipe laŭ via pli malpli konata oferdonemo !

La tuta bondezirkomplekso enhavas ion banalan, ofte eĉ ion ne tro moralan; sed ĝi apartenas al nia tradicio, ĝi apartenas al nia popolo kaj tial ni akceptu ĝin, kaj daŭrigu.

Tial : « Feliĉan Novjaron ! » ni deziras al vi, sed samtempe ni esperas ke ĉiu el vi en 1935 iĝu pli bona Esperantisto. Ne demandu kion ni alcelas per « pli bona Esperantisto »; ĉiu el vi tro bone komprenas. Por la plej « freŝaj » inter la gesamideanoj tio signifas : plian konon de nia lingvo; por aliaj : pli vastan koncepton de la interna ideo; por multaj : ambaŭ kune.

Krom tio ni deziras :

*al F. L. E.* : disvastigon kaj prosperon;

*al ĝia Prezidanto* : finan sukceson por malfermi al ni la pordegon de U. E. A., sur kies sojlo ni jam tiom longe atendadas;

*al la ligo kasisto kaj al ĉiuj aliaj* : grandan profiton dum la kriza tempo;

*al la grupoj* : multajn laboremajn gemembrojn;

*al la arupgvidantoj* : la necesan organizan talenton;

*al la Brusela Kongresa Komitato* : la eblon ĉiun kontentigi per kaj dum la venonta kongreso;

*al Flandra Esperantisto* : 1000 abonantojn;

*al niaj gelegantoj* : ĝustatempe aperontajn revuojn kaj la necesan propagandinstinkton por trovi pliajn novajn abonantojn;

*al niaj kunlaborantoj* : « nova (n) pli vigla (n) jam forto (n) » por kontentigi ĉiujn gelegantojn;

*al la leterskribanto de nia revuo* : la ruzan spritecon de la vulpo kaj la vigan observemon de la koko;

*al la redaktoro* : la penskapablon por regule ĉerpi ĉe la ĉefartikola fonto;

*al nia presisto* : la miraklan eblon presi senerarajn tekstojn senerare;

*al ni mem* : tutiaran pekardonon pro nia laboro.

La 1-an de januaro 1935-a.

LA REDAKCIO.

# Komunikoj de la Brusela Kongreskomitato



Kiam ni decidis akcepti la taskon organizi la 6-an Flandran Kongreson en Brussel, unu el la ĉefaj konsideroj kiuj nin gvidis, estis: ebligi al kiel eble plej da samideanoj la partoprenon.

Tial, en sia unua alvoko, la organiza komitato sciigis ke ĝi antaŭvidas la eblecon rekompenci la frualigontojn. Ni nun havas la plezuron sciigi, ke tiu rekompenco konsistas en tio, ke la kongreskotizo estas nur 10 fr. antaŭ Pasko. La organiza komitato, interkonsente kun Flandra Ligo, tiel decidis ĉar ĝi nepre deziras fiksi la prezojn de la kongresarangoj je tre favoraj kondiĉoj.

Sekve ni petas la estraranojn ke ili instigu siajn grupanojn al frua aliĝo, ili faros al ni grandan servon kaj samtempe havigos al siaj memroj la eblecon profiti rabatitan kongreskotizon.

La grupoj kiuj organizis ŝparkasojn ne prokrastu la aliĝon de la ŝparantoj sed ili pagu la kotizojn tuj kiam la enkasado tion permesas. El kelkaj lokoj nin atingis jam grupaj aliĝoj. En similaj okazoj ni tamen petas ke oni aldonu la nomojn kaj precizajn adresojn de la aliĝantoj.

Nia ŝatata angla s-ano Wadham organizos karavanon al nia kongreso. Ankaŭ en Nederlando la intereso por nia kongreso ŝajnas granda kaj karavano estas antaŭvidata.

Jam de nun ni povas certigi la kutiman rabaton (35 %) sur la enlandaj fervojoj kaj ni nun klopodas akiri rabaton sur la vaporsipoj Oostende-Dover.

Pri la kongresarangoj ni ne profetos sed tamen ni povas kun certeco jam diri ke ili estos tre allogaj kaj speciale prizorgataj. La festoj kaj kunvenoj okazos en belegaj kaj grandaj salonoj.

Ĉiu propagandisto, kursgvidanto, estrarano aŭ fervora samideano kiel eble plej baldaŭ havigu al si la belan, trikoloran glumarkon eldonita okaze de nia 6-a; ili kostas po 7 fr. por cent. (Mendojn ni nur plenumas post antaŭpago).

La grupoj, al kiuj ni sendis certan kvanton da glumarkoj kaj kiuj ne jam pagis ilin, estas petataj tion fari aŭ resendi la tromulton. (Resendojn ni nur akceptas ĝis la 4-a de februaro).

La organizoj kiuj intencas dumkongrese aranĝi fakkunsidojn estas petataj rilati pri tio plej baldaŭ kun la L. K. K.

La kongreskotizoj estas do fiksitaĵe jene: 10 fr.; post Pasko: 12 fr.; por eskterlandanoj: 2 Belgaoj, 2 1/2 Belgaoj post Pasko. La kongresa ĝirokonto sub n-o 4136.04 funkcias je la nomo de E. Cortvriendt, sekr. de la organiza komitato. Adreso de la kongresa oficejo: 3, P. van Humbeekstraat, Brussel-West.

**HELPU LA ORGANIZAN KOMITATON PER TUJA ALIĜO!**

**LA L. K. K.**

KUNVENO DE F. L. E. EN « BREUGHEL », BRUSSEL, LA 9-AN DE DECEMBRO 1934.

Ĉeestas delegitoj de Pioniro, Nele, Rekta Vojo, Nova Tagiĝo, La Estonto, el Hamme, Lede kaj Ronse.

La prezidanto plenumas la malgajan taskon sciigi pri la morto de nia sindonema samideano Marcel Troch el Oostende kies trankvila, servema figuro, ĉiam restos en la memoro de la partoprenintoj al nia V-a. FLE sendis florkronon je la enterigo, kaj kondolenceleteron al la funebranta familio.

Poste, la prezidanto pritraktas longe la internacian situacion kaj el la diskuto fine rezultas jenon :

1. — ke ni ĉiuj volas kunlabori kun UEA, fari propagandon por ĝi, varbi membrojn, sed nur sub kondiĉo ke finfine UEA akceptos la Flandran Ligon kiel landan asocion apud la alia Ligo en nia lando kiu, sendepende de FLE, propagandu laŭ politika plano, do en tuta Belgujo, dum ke FLE propagandas laŭ lingva teritorio, do nur en Flandrujo:

2. — ke la flandraj ligoj estonte pagu ĉiuj pere de FEI, poŝtĉeknumero 3268.51, por aniĝi al UEA;

3. — ke la prezidanto povos, en sia persona nomo, daŭrigi la pritraktojn koncerne la Bruselan rezolucion por eventuale trovi, interkonsile kun la delegito de BLE kaj la ĉefdelegito, eblecon por aranĝi la dividon de la UEA, propagando en nia lando.

Sub la gvidado de la LKK, la kunveno ekzamenas kaj aranĝas la tutan kongresprogramon. Sabate vespere, okazos la teatraĵo de nia Aarschot-a sekcio; krome danmuziko, kantado, filmo de la antaŭaj kongresoj, loterio, k. t. p.

Dimanĉe, ni promenos en la ĉefurbo, malantaŭ streĉtuko kun teksto : « Esperanto, Lingvo Internacia ».

Baldaŭ eldoniĝos speciala numero de FE, dediĉata al Brussel; kiu volas kunlabori, ĉu per artikoloj, kliŝoj, legendoj, poeziaĵoj pri Brussel?

La kongreskostoj estos plej moderaĵ; por la festeno inkluzive vinon maksimume 25 frankojn.

Post klarigo de LKK en la estrarkunveno, el kiu rezultis ke la LKK agis bonintence fiksante du kotizojn por la kongreso : 10 fr. antaŭ Pasko, 12 fr. poste, sed tamen agis kontraŭstatute, nuligante decidon de la ligkunveno kaj ne petante la konsenton de la liga prezidanto, la kunveno aprobis jenan aranĝon : la LKK pagos po 2 frankojn por ĉiu kongresano al F. E., kaj pri la restanta profito aŭ malprofito, oni agos kiel antaŭe decidite.

S-ro Lenaers poste donas detalojn pri la ega propaganda laboro kiun li jam efektivigis : pli ol 800 artikolojn li sendis al la flandraj gazetoj, 30 proksimume publikigis ilin laŭ lia scio, sed ni ĉiuj helpu lin sendante numeron de nia loka gazeto en kiu aperis artikolo.

S-ro Calloens ankaŭ publike gratulas S-on Debrouwere kiu sukcesis doni esperantan kurson en la radio-stacio Kortrijk kaj instigas niajn Antverpenajn kaj Bruselajn amikojn provi samon.

Fino Joukes petas informon pri UEA; la prezidanto promesas ke en FE aperos artikolo klarigante la celon, la utilecon kaj la nunan staton de UEA.

La LKK alvokas ĉiujn pagi la ricevitajn kongresmarkojn aŭ re-  
sendi la nevendebajn antaŭ la 1-a de februaro.

S-ino Sindwad parolas pri Mondpalaco kaj Cseh-kurso, ankaŭ  
invitas interesulojn kiuj kapablas paroli pri fama flandro: Benoit,  
Rubens aŭ alia, anonci sin.

La venonta kunveno okazos dimanĉe, la 24-an de marto 1935,  
en la liga sidejo « Breughel », Brussel. LA PREZIDANTO.

## Leteroj el Esperantujo

III

AMIKO LA KOKO,

Kiam vi legos tiun ĉi leteron, ni jam vivas en la jaro 1935! Pro  
tio mi deziras al vi, viaj kokinoj kaj kokidoj ĉion bonan! 1935 estu  
por via familio la jaro de la oraj ovoj!

Ordinare oni en novjarleteroj, post la bondeziroj rerigardas al  
la ĉefaj okazintaĵoj de la ĵus pasinta jaro. Mi ne agas tiel, sed mi  
skribos pri okazintaĵo de antaŭ 20 jaroj. Kial? Ĉar mi legis en  
« Heroldo » de 18. 12. 34 sub la rubriko « Esperantistaj Memorta-  
goj » la jenan: 19. 11. 1854 naskiĝis D.ro Valienne, verkisto de la  
unuj originalaj Esp.-romanoj: « Kastelo de Prelongo » kaj « Ĉu li? »  
Nu: « Ĉu li? » estas la unua libro kiun mi legis kiam mi esperantiĝis  
antaŭ 20 jaroj. Post apenaŭ du monatoj da memstudo mi renkontis  
entuziasman verdstelportanton, kiu ne sole donacis al mi verdan  
stelon (kiun mi ankoraŭ nun posedas) sed plue li pruntedonis al mi  
« Ĉu li? »

Ĝi estas libro de preskaŭ 500 paĝoj kaj ĝi rakontas la traviva-  
ĵojn de du ĝemelaj fratoj (= dunaskitoj) kiuj ĉiu por si ne scias  
pri la ekzistado de la alia. Vi povas imagi, kia ampleksa kaj impli-  
kiga legaĵo estas tia libro por komencanto! Mi legis ĝin dufoje.  
(Ankoraŭ nun mi legas ĉiujn Esp.-librojn dufoje). Proksimume  
cent vortojn mi ne komprenis. Ili estis plejmulte teknikaj vortoj  
kuracistaj, kiel « agonio » k. t. p. Naŭ jarojn poste mi legis « Kas-  
telo de Prelongo ». Ambaŭ libroj estas vere romantikaj, ege stre-  
ĉantaj la atenton, korbategaj kaj tremigaj. Nuntempe, oni ne plu  
verkas tiajn librojn, kaj ili ne plu estas acetebraj. Sed, se la Ant-  
verpenaj samideanoj volas legi ilin, tiam ili iru al la Esp. fako de  
la urba biblioteko, Blindenstraat, kie ili ankoraŭ estas pruntepre-  
neblaj. Oni ne bedaŭros! La legado de tiuj libroj estas ankaŭ inte-  
resa el alia vidpunkto: oni komparu nome la stilon, sintakson kaj  
vortfaradon de tiam kaj nuntempe.

La 4-an de decembro pasintan la plej maljuna Esperantistino fes-  
tis la 93an datrevenon de sia naskiĝo. Ŝi nomiĝas Anna Tuschinski  
kaj loĝas en Dantzig. Oni nomas ŝin « Esperanto-Patrineto ».

Kiam ŝi dum la Pariza Mondkongreso skribis sian nomon sur  
mia vizitkarto, mi admiris ŝin pro ŝia kandelrekta teniĝo. Sen okul-  
vitroj kaj per mano netremanta ŝi skribis... Tiaj momentoj ĉiam  
restos antaŭ miaj okuloj.

Vi scias ke precipe dum la lastaj jaroj, dank'al la Cseh-Instituto,  
la movado en Nederlando tre progresadis. La urbestro de Arnhem  
donacis antaŭ kelkaj jaroj al tiu ĉi Instituto la bienon « Presikhaaf »

kiel « Esperanto-Domo ». Nun la urbestro decidis ke la vojo, kondukanta de la urbo al la Domo, nomigos « Esperanto-Laan » (Esperanto-aleo). La nuna urbestro de Den Haag (Hago), antaŭe urbestro en Arnhem, estas fervora Esperantisto.

Sub la titolo « La Verda Sperto » aperas en « Heroldo » diversaj konsiloj pri kursoj kaj grupvesperoj de diversaj spertuloj. Inter alie S-ro W. Wingen donas konsilojn tre indajn por kursestroj. Je unu punkto mi volas atentigi vin :

« Insistu pri bona enmemorigo de la Esp. vortoj ! »

Mi spertis ke tio estas la plej malfacila, kion mi povis akiri de miaj lernintoj. La gramatikon, la regulojn ili facile kaj volonte lernis parkere. Sed la vortoj! Multfoje mi predikis: « Kion vi povas fari, posedante la gramatikon sed ne la vortojn? Vi estas kvazaŭ ĝeneralo kun kapabla kaj brila armea stabo sed... sen soldatoj! La vortoj estas la soldatoj sen kiuj via stabo nenion povas venki ! » Kaj al miaj lernantoj mi konsilis : Reservu ĉiun tagon unu duonhoron por la lernado de la vortoj. Prenu vian ŝlosilon Esperanto-nacilingvo kaj lernu la vortojn sub litero A. Poste vi lernu la vortojn sub litero A. el la ŝlosilo nacilingvo-Esperanto. Se vi konas ilin bone, daŭrigu per la vortoj Esp.-nacilingvo kaj nacilingvo-Esp. sub B. k. t. p. Ju pli oni progresas en ambaŭ ŝlosiloj, des pli faciligas la lernado ĉar sekvante tiun metodon, vi renkontas pli kaj pli vortojn, kiujn vi jam lernis. Eble mia metodo ŝajnas al vi enuiga; sed tiuj el miaj lernintoj, kiuj ĝin sekvis estis la unuaj kiuj kuraĝis paroli.

Kun konataj sentoj,

R. LA VULPO.

## Novjaraj Pripensoj

### ĈU ESTOS VI?

Ĉiujare dekoj, centoj da idealemuloj lernas Esperanton, iĝas Esperantistoj...

Ĉiujare dekoj, centoj da malkuraĝuloj malaperas jam post la unuaj lecionoj; dekoj ne plu abonas al iu esperanta gazeto, ne plu venas al kunvenoj, forlasas la vicojn, iĝas indiferentuloj.

Pro kiaj kaŭzoj?

Ofte sekve de personaj aferoj, de egoismo, de malinterkonsento inter samideanoj, ankaŭ pro ne sufiĉa esperanta vivo en la ĉirkaŭaĵo, pro malvigleco, pro manko de intereso dum la grupkunvenoj, fine, pro indiferenteco sen plu, pro maldiligenteco, pro dolĉa nenionfaro.

Flandra amiko aŭ amikino, ĉu estos Vi, kiu nin forlasos, kiu forkuros el la granda, verda familio?

Ĉu estos Vi?

Vi plendas pri ne rapida triumfo de la mondlingva ideo, de la mondlingva praktiko. Se estos Vi, vi ankaŭ estos nova kaŭzo por la prokrasto de tiu triumfo. Ne diru : la triumfo ne estas ebla en proksima tempo; la registaroj estas tro kontraŭaj; la adeptonombro restas tro limigita sekve de neoficialigo de la lingvo. Pripensu nur minuton kiel lasttempe novaj ideoj gajnis dum kelkaj jaroj milionojn da samideanoj ! Pripensu kiel popoloj, kiuj hieraŭ ankoraŭ restis kvazaŭ en eterna dormado, sub fera subpremado subite levigis kaj



vivas. Pripensu kiel la tiel vasta mondo nun similas lando facile travojagebla en kelkaj tagoj... Nemo plu ŝajnas neebla en la modernaj tempoj...

Okazas ke jen triumfo estas gajnata per misteraj, magiaj rimedoj; jen ĝi estas la irukio de longaj, penaj klopodoj, de akraj bataadoj, de konstanta, senlaca, ciankuraga laboro.

Ni, kaj ankaŭ vi ĉiuj esperas ke la triumfo de Esperanto okazos subite, kvazaŭ magie. Kaj tio certe ne estas maleblajo. Ankaŭ por Esperanto iam neatendite povus sonegi la paskaj sonoriloj de la definitiva levigo, de la ĝia epoko.

Kaj tiam, ĉu ankaŭ Vi ne ĝojus tutkore, fiere, triumfante?...

Tamen, se Esperanto restas kiel ĝis nun, nur povante apogi sur propraj fortoj, tial vi ne povas perdi la kredon je ĝia fina venko, ĉar feliĉe jam multnombraj estas la signoj de ĝia konstanta, marrapida, senbrua kreskado.

Vidu la ekzemplon de du pioniroj en nia lando, kiuj dum la pasinta jaro forlasis nin: J. A. Witterijck kaj Frans Schoofs. Ambaŭ senĉese, kuraĝe laboris por Esperanto de post sia esperantistiĝo, kaj restis fidelaj al la idealo ĝis sia tro frua morto. Ili ankaŭ ne vidis tiun finan triumfon, tamen entuziasme kredis en ĝi.

Ĉu nia majstro Zamenhof haltigis sian laboron ĉar dum jaroj nur kelkaj amikoj apogis lin, ĉar poste aliaj kontraŭstaris lin, klopodis dividi la samideanaron, mokis pri la Zamenhofa vivlaboro? Ne, li daŭrigis kun forta kredo!

Kaj Vi?

Ni solvu personajn aferojn en persona atmosfero; ni ne aŭskultu la egoisman voĉon de nia tro homa koro; ni forigu malinterkonsenton kaj trapenetrigu nin de la interna ideo de Esperanto.

Se la esperanta vivo ĉirkaŭ vi estas tro malvigla, se la loka grupo estas tro malinteresa, kunlaboru laŭ tutaj fortoj por ŝanĝi tiun staton. Pripensu ke via iniciato eble povas rompi la malnovajn kutimojn. Tro ofte okazas ke samideanoj sin interesas pri multaj aliaj kulturideoj, estas membroj de deko da aliaj ligoj aŭ asocioj. Tio certe estas laŭdinda, tamen unuavice Esperanto bezonas vian konstantan kunlaboron, vian daŭran subtenon. Se vi nur de temp' al tempo iras al la kunvenoj, ne estas eble ke vi flue parolu nian lingvon, ne estas eble ke vi sentu esperante. Esperanto postulas vian ekzemplon, vian agemon, vian amon.

La ideo pri la esperantismo de si mem ja estas sufiĉe ampleksa por kapti vian tutan intereson, ĉar el ĝi unuavice devas naskiĝi la frata sento, kiun la mondo tiel bezonas por iĝi inda de la nuna civilizo, kiu devus alporti feliĉon al ĉiuj sed kiu kontraŭe riskas provoki hontegan murdadon.

Ne Vi ne volos pro via indiferenteco, pro via foriro iĝi, eĉ nur iomete, kunkulpulo al tiu-ĉi granda malfeliĉo.

Vi restos, vi laboros, vi kunbatalos, plenkuraĝe, man' en mano, kun ĉiuj pacemuloj.

Ne! ne, Samideano, Samideanino, ne estos Vi!

Dum la nova jaro la verda stelo por vi senĉese brilos kiel Venuso ĉe la spirita ĉielo; tamen ĝi ne estu nur matena aŭ vespera, sed tuttaga, tutjara, ĉiama stelo, la verda stelo de amo inter la popoloj, kiu neniam plu subiros je iu horizonto!

Pol VARENS.

# Universala Esperanto - Asocio

En la revuo « Esperanto » de aŭgusto-septembro 1934, sub titolo : « Unueco ! » S-ro Bastien, nova prezidanto de UEA, senvuale konigas la minacajn situacion de tiu asocio, kiu devos « fermi la butikon », se oni ne sukcesas ekvilibrigi la budĝeton.

S-ro Bastien alvokas ĉiujn al fido; en la nuna tempo devas silentu ĉiu interdiskuto - kaj pri kio oni diskutus kiam brulas la domo?

La nova komitato havas neŝanceblan volon restarigi normalan situacion, kaj promesas ke ĉiu franko estos utile uzata, ke oni faros neniun elspezon nenecegan.

Malgraŭ la malkonsentojn kiujn ni havis kun UEA, FLE decidis dum ĝia lasta kunveno, ke decas ke ni helpu, eĉ modeste, por savi la dronantan ŝipon.

La unua devo de niaj sekcioj estas ke ili senescepte petu la represon de grupanonceto en la jarlibro, kio kostas 8 frankojn.

## *Kotizoj al UEA :*

Membro kun jarlibro (MJ) 25 fr.  
ricevas membrokarton, servo-kuponaron, jarlibron kaj rajtas premion de frupago.

Membro-abonanto (MA) 50 fr.  
ricevas suprajn favorojn kaj la revuon « Esperanto » dum unu jaro.

Membro-subtenanto (MS) 185 fr.  
ricevas la favorojn de MA kaj la premion de subtenanto.

Aliĝo al UEA kaj FLE kune : MJ, 45 fr.; MA, 70 fr.

Realigo de malnovaj membroj pagintaj por 1933 kostas : MJ, 16 fr.; MA, 40 fr.; MS, 175 fr.

La ĉefa ideo de UEA estas servi al la samideanoj laŭ sistemo reciproka. Plej uzata estas la servado de la delegitoj, informpetoj pri ĉiuj eblaj aferoj, helpo dum vojaĝo, k. t. p. Krom tiu ĉi Servo de Informpetoj ekzistas aliaj servoj, pri kiuj aperas sciigoj de tempo al tempo.

Se ne jam estas en via loko delegito de UEA, anoncu vin por tiu funkcio.

Ĉiujn pagojn por UEA, oni faru senescepte pere de FEI, poŝt-ĉekkonto n° 3268.51.

## Diversaĵoj

*Insignoj.* — Pluraj katolikaj samideanoj informpetis la prisribon de la insigno menciata en la pasinta bulteno.

La insigno estas de la sama modelo kiel tiu de 2,25 fr., sed kun kruco en la mezo anstataŭ la kutima litero E. Ĝi kostas 2,25 fr. kaj estas havebla nur kiel pinglo. La afranko kostas ĝis 250 gramoj 0,50 fr., sekve estas rekomendinde mendi plurajn insignojn en unu fojo.

*Ekzamenoj.* — La grupoj kiuj volas okazigi ekzamenojn, jam povas rezervigi daton (plej bone antaŭ Pasko), sed ne la 2an de marto; kiu unue demandas havos ĉiun okazon! Ĉiuj informoj ĉe F.ino J. Terrijn, Raapstraat, 82, Gent.

# Poezio

## AMORA TRIPTIKO

Kiam la okulo via  
Ekparolas kun la mia,  
Tuj revivas la feliĉo  
Kvazaŭ pere de feliĉo,  
Forpelante nostalgion,  
Vigligante energion;  
Ĉar rigardo de knabin  
Sorĉo estas por l'anim'.

Kiam ĉarma rido via  
Sonas klare, koro mia  
Tuj plenigas per la ĝojo,  
Kvazaŭ sur la vivovojo  
Gloron trovus mi subite.  
Mi konfesas senhezite :  
Estas rido de knabin'  
Ja nektaro por l'anim'.

Kiam tamen buŝo via  
Flustras : « Venu, knabo mia,  
Iru ni en paradizon,  
Forgesante ĉiun krizon. »  
Emocie mi kuniras...  
(pli mi certe ne deziras!)  
Amovorto de knabin'  
Jen ekstazo por l'anim'!

*Pol VARENS.*

## REVIS MI PRI IDEALA VOJO...

Revis mi pri ideala vojo,  
Sur kiu ambaŭ marŝus ni.  
Kredis mi en amo, ĝojo,  
Feliĉ', eterna poezi'.

Sed hodiaŭ sur la proza strato  
Silente ambaŭ paŝas ni...  
Estas vana la celado,  
Kaj mia amo utopi'.

Samideaneca amo viva  
Eĉ ne ekzistas inter ni...  
Sugestio tro naiva,  
Vi restas nura fantazi'.

*Pol VARENS.*

## MI LEGAS EN OKULOJ VIAJ...

Mi legas en okuloj viaj  
heziton kaj melankolion;  
sed malgraŭ tio koro via  
Por mi eksentas simpation.

Rigardo via min altiras  
kaj fleksas mian voloforton,  
rigardo via kaŭzas ĝojon  
mistikan kaj... spiritmalordon!

Feliĉo homa estas aro  
Da multaj malgrandajoj emaj;  
El rid', rigard' kaj vort' naskiĝas  
Ekstazoj tujaj kaj ekstremaj.

Okuloj viaj la sekreton  
Forkaŝas. — Ĉu malnova amo?  
Ĉu dev' feliĉon malebligas?  
Ĉu estas mia am' profano?

Kaj ĉiam en okuloj viaj  
Mi legas la melankolion;  
Sed mia kor' ja pli bezonas  
Ol simplan, gajan simpation.

*Pol VARENS.*

## ĈU SEKRETO ?

Kvankam en okuloj miaj  
Legas Vi pri la dezir',  
Spite lingvo de pasiaj  
Ekrigardoj kaj admir',

Sajne Vi min ne komprenas.  
Stranga restas la ridet',  
Kiu ĉiam ree venas  
Kuraĝigi min... Sekret'!

Ne, ne estas am' sekreta;  
Mi nur estas tro diskreta,  
Pro grandega emoci'.

Tial do mi ne sukcesis,  
Ĉar timeme mi forgesis  
Vorte diri ĝin al Vi...!

*Pol VARENS.*

## INFRANPREĜO

Patro nia en ĉielo,  
Paĉjo diris ĝin al mi,  
Ke forprenis Vi patrinjon  
Ĉar Vi amas ŝin, ho, Di'.

Mi recevis novan pupon  
Kun lulil' laŭ mia pet';  
Sed ne volas mi ludadi  
Sen la kara patrinet'.

Bono Via, granda Dio,  
Estas sen komenc', sen fin';  
Do, redonu al mi panjon,  
Aŭ forprenu ankaŭ min.

*Cath. J. Roskes - Dirksen.*

## TREZORO

Al Fino. Marg. Sintobin.

Trezoro mia estas Vi,  
Al Vi forflugas la animo,  
Pri Vi la pensoj en la kap'  
Nur sole estas, karulino!

La idealo estas Vi  
Al kiu preĝas mi konstante.  
Sincere, milde gardas mi  
Devizon nian plenumante.

El malproksima suda land'  
La manon mi etendas kore,  
Gratulas Vin, salutas Vin,  
Kaj skribi volas mi fervore.

Ekfloru lukse Via viv'  
Ornamu Vin ja kron' feliĉa,  
Ke per la rozoj de l'estont'  
La vivo Via estu riĉa!

*A. P. Drosdow.*

(Tschkent, Centra Azie,  
U. S. S. R.)

# Bibliografio

Dr. J. LAUREIJS. — « Wat wil het Sociaal-Reformisme? » uitg. Ila-  
hèlei, 135, Antwerpen.

Dr. J. LAUREIJS. — « Het Collectivisme in het jaar 2000 » uitg. De  
Korenaar; 28, Albert Lisnertstr., Aalst. 527 blz. 12 × 19. Prijs :  
25 Frs.

Schrijver ziet in de wereldcrisis slechts de laatste stuiptrekkingen van het  
Kapitalisme en maakt de parallel tusschen dit regiem en den totalitaireren corpo-  
ratieven volkerenstaat onder het technisch volmachtstelsel. Geen dictatuur dus,  
maar de leiding van **sociaalvoelende** vakgeleerden onder controle van volk en  
beroepsgenoten. Het privaat en nationaal eigendomsrecht op het productie-  
middel is afgeschaft, doch iedereen is eigenaar door de collectiviteit. De staat  
waarborgt het individu — eenmaal voldaan aan de arbeidsverplichting — een  
menschwaardig doch streng begrensde inkomens, evenals het recht vrij te leven  
volgens zijn wijsgeerige of godsdienstige beginselen. De grenzen der gewesten  
zijn deze der taalgemeenschappen, die cultureele autonomie genieten doch onder-  
worpen blijven aan het algemeen regiem van het « bevoorradingsgebied »  
waar ze van af hangen.

Eens de principes gesteld, toont schrijver er den logischen uitbouw van,  
voornamelijk zijn heilzame gevolgen voor het « Nederlandsch gewest » en tracht  
hij alle opwerpingen tegen het stelsel te ontzenuwen. De plaatsruimte laat niet  
toe hier eenige critische vragen te stellen, doch ons Esperantisten past het  
zeker — niet te spoedig van « utopie » te gewagen doch integendeel kennis  
te nemen van deze weldoordachte, alhoewel wat omslachtige uiteenzetting, te  
meer daar schrijver het enkelen onzer reeds gunt nog practisch van deze  
nieuwe wereldorde te genieten, mitsgaders de « groengesterde » vreugde het  
Esperanto zijn rol als tweede, opgelegde taal, in dit regiem te zien spelen.

FRITZ FRANCKEN. — « Batig Saldo ». Uitg. J. Meuwissen, Brus-  
sel. 53 blz. 19 × 27.

De tegenover onze beweging sympathiek gestemde auteur, van wien reeds  
meerdere novellen in het Esperanto werden overgezet, verantwoordt zelf als  
volgt deze uitgave : « In dit bundeltje werden de o. m. a. uitgekozen, door  
mij sedert 1913 geschreven verzen vereenigd, — batig saldo van dolle avon-  
turen. Mocht ik me in mijn afrekening vergist hebben, dan gelde één veront-  
schuldiging : het geschiede te goeder trouw. Men kan argeloos zijn op elken  
leeftijd. Zij het niet zonder een zweem van zelfbedrog. « Jen esperantigita ver-  
sajo el la libro » :

## EPITAFIO POR FLORKNABINO

Vi vivis inter rozoj,	Ĉar kiel roz'ekfloris
ter'estis nur ĝarden',	kor'via al ĉiel,
kaj inter tiuj rozoj	kaj febra ruĝ'koloris
vi estis roz'en plen'...	vin, meze de rozbel'.

Ekburĝoninta rozo,  
vin tuŝis morta pik' :

Vi mortis kiel rozo,  
forvelkis la kalik'.

T.

La Lyon'a Foiro ĵus eldonis novan afiŝon. — Nia gazeto ricevis ekzemple-  
ron de la nova esperantlingva afiŝo de la Lyon'a Foiro. Ĝi estas trikolora kaj  
mezuras 60 cm. × 1 m. Post kelkaj tagoj la Lyon'a Foiro eldonos ankaŭ novajn  
tripaĝajn artajn prospektojn en esperanto. Por senpage ricevi la afiŝon kaj la  
prospekton, oni skribu al : Foire de Lyon, Esperanto Fako, Rue Ménestrier,  
Lyon, Francujo.

LA ESPERANTA KALENDARO 1935. (20 × 12,5 cm.). — Eldono de  
Brita Esperanta Asocio, 142, High Holborn, London W. C. 1. — Prezo : 1 ŝi-  
lingo angla aŭ 5 internaciaj respondkuponoj, aŭ frankite.

La Esperanta Kalendaro 1935 aspektas kiel taŭga notfoliaro. Por ĉiu se-  
majno ĝi enhavas paĝon, kies duono estas esperantlingve surpresita per citaĵo  
aŭ originilaĵo, inter kiuj kelkaj havas la nuran valoron parte kovri la eldonkos-  
tojn! La alia duono estas rezervita al privataj notoj.

Ni admiras la klopodon de B. E. A. kaj deziras al ili merititan sukceson. **Belan multkoloran reklamilon** esperantlingvan sendis al ni Sro. R. Unger, Svisa samideano, propagandisto de la hotelo « Rigi First ». Niaj flandraj samideanoj, kiuj ja ĉiujare multnombre (!) vizitas Svislandon, certe loĝados en la Sportkaj Famili-Hotelo « Rigi First », Rigi (Vierwaldstättersee) Svislando.

## Gratuloj

Esperantistido naskiĝis ĉe la familio Marius Geenens-Verhelle pro kio ni gratulas nian aktivan kaj fidelan membron de la « Paca Stelo » el Ronse.

## Nekrologo

MARCEL TROCH †

La 29an de novembro, niaj Oostendaj samideanoj suferis grandan perdon, pro la morto de ilia kara sekretario, Marcel Troch. La fatalo forprenis de ni amatan amikon, kiu ankoraŭ longe vivos daŭre en la memoro de la Flandra Esperantistaro. La terurega novaĵo de lia morto, en la aĝo de 24 jaroj, konsternis nin treege. Komence neniu volis kredi ke tiu simpatia junulo estas trafita de la morto. Sed estas ja vere. Marcel ne plu estos inter ni, ni neniam plu aŭdos lian voĉon, ne plu vidos lian rideton; li nun ripozas en la tombo; li ripozu en paco.

Lia morto estas perdo ne nur por la grupo el Oostende sed por la tuta Flandra Esperantomovado. De l'unua momento de lia esperantistiĝo li staris apud ni kaj ni profitis de lia kapableco. Li estis persone konata de multaj samideanoj, ĉar estas ja li kiu akceptis la malfacilan taskon plejparte organizi la jubilean 5an kongreson.

La 3an de decembro okazis la enterigo ĉeestita de multaj simpatiantoj. Dum la diservo « La Espero » orgene ludigis kiel lasta honoro de liaj amikoj al li. La tuta grupo kun la flago ĉeestis la enterigon. S.ro Snykers, la prezidanto, la mortinton ankoraŭ foje memoris per malgranda parolado. Kune kun multaj aliaj florkronoj, ni ankaŭ metis florkronon kaj bukedon nome de la loka grupo kaj de Flandra Ligo, ĉe la tombo, lia ripozejo ĉiama.

Al la nekonsoleblaj gepatroj kaj fratino, kaj al la tuta funebranta familio, ni prezentas, nome de ĉiuj Flandraj Esperantistoj niajn plej sincerajn kondolencojn. FLANDRA ESPERANTISTO.

En Antwerpen mortis la 17an de novembro 1934, S.ino Silvina MICHAUX, edzino de Emile VAN STERTEGEM, vicprezidanto de « La Rekta Vojo ». Sincerajn kondolencojn!

XXVII.a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. XI.a SOMERA UNIVERSITATO EN ESPERANTO. KONGRESA KROZADO EN LA MEDITERANEA MARO.

ROMA, 3-10-17 aŭgusto 1935/XIII

U. E. A. — TURISMA SERVO (komisie : Esperanto-Centro Itala, Galleria Vittorio Emanuele, 92, MILANO. Italio).

TURISMAJ ARANĜOJ

okaze de la 27.a Uniuersala Kongreso de Esperanto, Roma 1935. KOTIZOJ (en italaj liroj)

1. KONGRESA KOTIZO, ĝis	fino	31.1.35	30.4.35	30.6.35
A. plena kotizo		100	70	80
B. familiano		60	42	48
C. junulo		40	28	32

TURISMAJ KOTIZOJ (la Kongresanoj, regule pagintaj la Kongresan kotizon, rajtas je fortaj *rabatoj* ĉe la turismaj kotizoj. Ĉi sube, apud la *plenaj kotizoj*, validaj por simpla turisto ne-Kongresano, estas indikitaj la RABATITAJ KOTIZOJ, valida, NUR por Kongresano.

2. BAZA KOTIZO « T » (por la tuta granda vojaĝo « Tra Italio ») :	plena	por
	kotizo	Kongresano

Fervoja vojaĝo de itala limo ĝis Nàpoli kaj reen ĝis itala limo; turisma aranĝo en Firenze, Roma, Nàpoli, kaj survoje, laŭ la detala programo; Granda Kongresa Ekskurso Nàpoli-Pompei-Capri-Nàpoli; ekspedoj kaj transportoj de la pezaj pakaĵoj .....

526.— 498.—

3. KONGRESA KROZADO (« Al Afriko », granda ŝipvojaĝo septaga) :	plena	por
	kotizo	Kongresano

Ŝipvojaĝo de Nàpoli al Siracusa, Malta, Tripoli, Palermo, Insulo Elba, Genova; lito kaj tri manĝoj tage sur la ŝipo; teraj ekskursoj kaj vizitoj; prelegoj kaj festoj sur tre komforta speciala ŝipo; loko en

S: salono, kun multaj litoj .....	375.—	355.—
A: kajuto kun 2-4 litoj, turista klaso, interna	495.—	472.—
B: kajuto kun 3-4 litoj, turista klaso, ekstera	518.—	495.—
C: kajuto kun 2 litoj, turista klaso .....	543.—	520.—
D: kajuto kun 3-4 litoj, II.a klaso .....	595.—	570.—
E: kajuto kun 2 litoj, II.a klaso .....	615.—	590.—
F: kajuto kun 3-4 litoj, II.a supera klaso ...	640.—	612.—
G: kajuto kun 2 litoj, II.a supera klaso .....	658.—	630.—
H: kajuto kun 3-4 litoj, I.a klaso .....	695.—	655.—
I: kajuto kun 2 litoj, I.a klaso .....	720.—	680.—
J: kajuto kun 1 lito, I.a klaso .....	757.—	715.—

NOTOJ. — La tuta aranĝo sur la ŝipo estas absolute komforta : la ŝipo mem estas speciale aranĝita por turismaj Krozadoj.

— La manĝoj estas egalaj por ĉiuj klasoj: la diferenco de la prezoj estas pro la malsameco de la kajutoj kaj de la rilata komforto en la superaj klasoj.

— En la Salonoj kun multaj litoj ne estas supermetitaj ŝipkuŝejoj, sed apudmetitaj tre bonaj ferlitoj, kun sufiĉega spaco, apartaj duŝejoj, lavejoj, ktp.

— En multaj kajutoj la litoj estas hotelaj litoj, ne ŝiplitetoj.

— Ĉar la nombro de la lokoj sur la ŝipo estas precize limigita, la aliĝoj devas alveni kiel eble plej frue.

— La unuaj aliĝintoj ricevos nepre ĉian preferon.

Informas : ESPERANTO-CENTRO ITALIA, Galleria Vittorio Emanuele, 92, MILANO.

## Inter Ni

### OSTENDO. — ESPERANTISTA GRUPO.

Pro la morto de nia kara amiko Marcel Troch, ni ĉesigis la kurson dum unu semajno. Ĉar li estis nia sekretario ni devis trafi kelkajn ŝanĝojn en la estraro de nia grupo. Lastan sabaton tial ni kunvenis. Sekretario nun estos amiko Roelandts, J., Oudenburgsche Steenweg, 8. Delegito estos amiko G. Decleer, Torhoutsche Steenweg, 150. —

Ĉi tiun jaron ni povas diri ke ni havas sukceson, ĉar la nuna kurso funkcias pli bone ol la antaŭa. Ĝin partoprenas 42 gelernantoj.

**AARSCHOT.** — **LA PROGRESO.** — La lumbildvespero, kiu okazis la 23an de novembro tutplene sukcesis. Tiel ni konstatis ke niaj gemembroj korespondas kun dudek diversaj landoj. Je la komenco aperis la honorinda vizaĝo de nia Majstro sur la ekrano. Sro. J. v. Winkel parolis kelktempe pri la vivo de D.ro Zamenhof kaj ties batalo por lia idealo. Sekvis bildoj el preskaŭ ĉiuj landoj eŭropaj kaj kelkaj ekstereŭropaj dum S.ro v. Winkel donis necesajn klarigojn.

Post la lumbildoj estis donita premio al la membro kiu plej bone tradukis la kanton « Eliza » el la flandra filmo « De Witte ». Gajnis ĝin kun laŭdo F.ino Bertha Goossens.

Je la fino ĉiuj entuziasme kantis « La Espero ». Tiel finiĝis unu el niaj plej gajaj kaj lernigaj vesperoj.

**BRUSSEL.** — **N. E. L. E.** — La 5-an de decembro okazis en nia ejo interesa lumbildparolado. Nia fervora anino E. Sindhwad parolis pri: Brussel (ĝia origino, evoluo kaj signifo kiel grandurbo) Niaj anoj kiuj ne ĉeestis tiun instruan paroladon vere malpravis. Post la parolado f-ino Minne de la « Schola Cantorum » aŭdigis kelkajn Esperantajn kantojn.

Sabate la 22-an de decembro ni interkonatiĝis kun la lernantaro de Mondpalaco dum kantvespero organizita en la knabina lernejo Fetisstraat Etterbeek.

**PETO :** Ni petas la grupojn kiuj posedas fasadflagojn kaj kiuj estas pretaj pruntedoni ilin al ni por dumkongresa uzo ke ili avertu nin pri tio. Dankon!

### RONSE.

Programo : 2n de jan. nenio okazas okaze de la novjarfestoj.

9n » Generala kantvespero.

16n » Grava ĝenerala deviga kunveno.

23n » Gramatikaj malfacilaĵoj (akuzativa formo) kun ĉiuj detaloj de S.ro Broodcoorens.

### ANTWERPEN. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Dum la lasta monato de la jaro, nia grupo sin speciale okupis pri la aranĝo de la kristnaska festo. Jam nun ni estas certaj ke ĝi sukcesis. En la februara numero aperos detalan raportan.

**KORTRIJK.** — Merkredon, 2-an de januaro, monata kunveno en la kutima ejo.



La publika kurso ne estos interrompata pro la novjarfesttagoj, oni de bonvolu noti ke okazos kurso en la urbodomo, jaŭdon, 3-an de januaro, je la 7 1/2 vespere.

**RUSELARA ESPERANTISTA GRUPO.** — Ni antaŭvidas la finon de nia Esperanto kurso antaŭ la apero de tiu ĉi numero (de F. E.).

Preskaŭ ĉiuj komencintoj persistis ĝis la fino. La esperantista mezo ŝajnas tre plaĉi ilin. Por pli gajigi la lecionojn ni ĉiun semajnon kantis unu aŭ alian kanton komencante per la konataj flandraj esperantigitaj kantoj.

Propagandcele, ni disdonis al la lernantoj, malnovajn numerojn de F. E. kiel specimeno. La legado de nia revuo estas certe, post la lecionoj la plej taŭga maniero por perfektigi sin.

La 14-an de decembro okazis la ĝenerala kunveno, kun agrabla surprizo por la ĉeestantoj.

**MECHELEN.** **LA ESTONTO.** — Dum tiu ĉi vintro, ni konstante kaj vigle laboras. La membroj regule ĉeestas la kunvenojn kaj niaj du kursoj bone funkcias.

La plej grava okazintaĵo dum la ĉi lastaj monatoj estis la vizito de nia nederlando amiko, internacia esperanta propagandisto : Sipke Stuit. Ni speciale notas liajn vortojn pri nia simpla kurso : « Gratulon al vi fraŭlino Van de Werf, kiu kuraĝe instruas, por sentigi al la novuloj la belon de nia lingvo! »

Estas ĝoiga fakto ke nuntempe niaj plej fervoraj samideanoj jam bone parolas esperanton dum la semajnaj kunsidoj.

Sekve de tio ekde januaro ni ŝanĝos la labormetodon. Ĉiuj estas invitataj pretigi interesajn preparoladojn, prelegojn, ludojn, k.t.p. Tiamaniere la vendredaj vesperoj iĝos surprizoj neantaŭvideblaj!

Ni plenkuraĝe eniras la kvaran jaron de nia grupa ekzistado.

**EDEGEM.** — Nia Idealo. Nia grupo malrapide antaŭeniras sed ĝia laboro estas bone prizorgita kaj ni kutimas niajn anojn regule ĉeesti la semajnajn kunvenojn. Jam de kelka tempo ni decidis ke ĉiun semajnon, iu ano faru mallongan paroladon pri ia temo, laŭvole kaj tiu paroladekzerco iĝas pli kaj pli interesa, kaj niaj membroj, en mallonga tempo, parolos la esperantan lingvon kiel sia patrina lingvo.

Nia grupo klopodas obteni la vilaĝan subtenon por ke ni havu la okazon starigi grandiozan kurson post grandega kaj intensa propagando. Sed ĉu ni sukcesos estos alia demando! Tamen, se ni ne akiras la subtenon ni esperas ke ni kapablos malfermi kurson kun la kunhelpe de kelkaj bonvolemaj amikoj kaj samideanoj.

La sekretario de la Flandra Ligo Esperantista en Kortrijk estas petata konatigi al ĉiu grupsekretario la kondiĉojn por akiri la ŝtatan subtenon, pri kiu oni jam ofte parolis kaj skribis.

Nia fervora sekretario, D. Mortelmans, sukcesis en la ŝtatekzameno por juĝista agento. Plej korajn gratulojn al li.

Kiu havigas al ni kelkajn adresojn de esperantistoj el la jenaj landoj : Hindujo, Sud-Afriko, Brazilio, Australujo, Sumatra kaj la landoj tre proksime de la lastnoma. Bonvolu sendi vian komunikon al : Nia Idealo, Drie Eikenstrato. 665, Edegem-Antverpeno. Kun antaŭdanko!

# Novjar-Bondeziroj

LA LIGESTRARO al sia fidela membraro deziras por 1935 bonan sanstaton. Speciale por la ĉefredaktoro, Sro. Juul Karnas, ĝi esperas je plena resaniĝo.

Ges. oj L. CALLOENS-MARRON al la tuta esperantistaro sendas siajn bondezirojn por 1935 : sanecon, vigecon kaj laboremecon sur la verda kampo.

GERARD DE BOES kaj edzino por la jaro 1935 al ĉiuj samideanoj, viraj kaj virinaj, deziras ĉion, kio estas dezirinda.

JULIETTE TERRY por 1935 deziras al ĉiuj gekonatuloj plej bonan sanon kaj efektiviĝon de ĉiuj kordeziroj.

J. VAN DEUN, Turnhoutschebaan, 277, Borgerhout-Antwerpen, sekretario de la F. U. K. E. bondeziras al nia vigla prezidanto kaj provincaj delegitoj feliĉegan kaj prosperan novjaron.

RUSELARA Esperantista Grupo bondeziras ĉiun F. L. E. anon. H. & H. BRAEKEVELT, Statiestraat, Roeselare : ĉian bonan al Vi dum 1935.

PRESEJO H. BRAEKEVELT deziras por 1935 rapidan presaj-konsumon!

FAMILIO J. AS: Feliĉan novjaron al ĉiuj; propagandu Esperanton!

Ges. oj. A. LODEMA-VAN REEDEN : Feliĉan novjaron!

LA FLANDRAJ KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ prezentas al Lia Pastra Moŝto De Coene, Pastro de niaj kongresoj, siajn bondezirojn por 1935.

LEONIE JOUKES al la Prezidanto de la Rekta Vojo Juul Karnas: plej sincerajn bondezirojn, speciale bonegan sanon.

LEONIE JOUKES prezentas al la Prezidanto de F. L. E. Sro. Calloens, lia edzino kaj idaro plej sincerajn bondezirojn por 1935.

LEONIE JOUKES deziras por la tutmonda Esperantistaro feliĉan jaron, bonan sanon kaj bone pagitan laboron.

Okaze de Novjaro la inoj de LA REKTA VOJO elkore sendas rektvojjajn kisojn kaj la viroj fortan manpremon al sia karega Prezidanto Juul Karnas en Svisujo kaj deziras baldaŭan tutan resaniĝon kaj revenon al la grupo.

Kiel anino de « La Rekta Vojo » mi deziras al S.ro J. Karnas, la prezidanto, plej baldaŭan resaniĝon kaj revenon en nia mezo. Tion kion mi deziras al li kiel edzino, mi pli ŝatas sciigi al li pere de privata letero. IRMA KARNAS-VERHOEVEN.

FELICAN NOVJARON al ĉiuj F. L. E. anoj deziras Malsanulo el Svislando:

S.ro H. V. DURME deziras al ĉiuj gekonatuloj, Esperantistoj, korespondantoj eksterlandaj ĉian bonon por 1935.

---

---

## **FLANDRA LIGO ESPERANTISTA** **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

**Voorzitter:** Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.

**Ondervoorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 24, Mechelen.

**Sekretaris:** Gérard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.

**Penningmeester:** Bernard Bassleer, Wagenmakerstraat, 45, Kortrijk.

**Propaganda:** Gérard Lenaers, Willemstraat, Hamme.

**Postcheck:** Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.

**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.

**Lidmaatschap** (met maandblad): 20 fr. per jaar.

### **Aangesloten groepen:**

**Aalst:** « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.

**Aarschot:** « La Progreso »; lokaal « Den Haas », Groote Markt; vergaderingen elke Zaterdag avond.

**Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esperantista »; lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70; vergaderingen elke Woensdag avond.

« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen elke Donderdag avond.

**Brugge:** « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.

**Brussel:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.

**Edegem:** « Nia Idealo », Hovestraat, 130.

**Hamme:** « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.

**Kortrijk:** « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.

**Lede:** « La Esperanta Stelo »; Krommenellenboog, 6; vergaderingen 1<sup>o</sup> en 3<sup>o</sup> Dinsdag der maand.

**Leuven:** « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.

**Lichtervelde:** Sekretariaat, Weststraat, 47.

**Mechelen:** « La Estonto », lokaal: Bovenzaal der stedelijke Bibliotheek, Wolle markt; vergadering elke Vrijdag te 20 uur. — Briefwisseling: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54.

**Nieuwpoort:** « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Langestraat, 6.

**Oostende:** « Esperantista Grupo »; Oudenburgsche Steenweg, 8.

Vergadering des Zaterdags om de 14 dagen ten 20 u. « Hôtel de la Marine ».

**Oudenaarde:** « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat.

**Roeselare:** « Ruselara Grupo Esperantista »; Statiedreef, 177.

**St. Niklaas:** « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

### **Alle inlichtingen verstrekken verder te:**

**Diksmuide:** M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.

**Gent:** Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.

**Harelbeke:** A. Doornaert, Stacegemstraat.

**Hoboken:** H. Van Tiggel, Commandant Weynsstraat, 174.

**Maria-Hoorebeke:** Gérard Broodcoorens, Dorp.

**Meenen:** K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.

**Millen (Tongeren):** L. Geukens, Langstraat.

**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.

**Ronse:** M. Geenens, St. Cornelisstraat, 13.

**Thielt:** R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

---

---

OSTENDO

## HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

ESPERANTISTOJ!!!

La

### KANTARO ESPERANTISTA

Kompilita de Juul Karnas

enhavas 111 kantojn.

estas 112 paĝa,

enhavas ion por ĉies gusto,

enhavas la plej belajn perlojn el la

popolkantoj de ĉiuj nacioj,

estas bele eldonita,

kaj ... kostas nur 6 frankojn!

Mendu ĝin tuj ĉe Flandra Esperanto  
Instituto.

### « BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj

malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

**Kien iri je Pentekosto 1935? (8 - 10 Junio)**

Al la

**6<sup>A</sup> Flandra Kongreso de Esperanto en Brussel**

**300 Bildojn Kaj 1100 Titolvortojn**

en densega komposto prezentas al vi la

UNUA VOLUMO DE

## ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO

sur 272 teksto- kaj 112 bildopaĝoj, formato 15×23. La dua volumo ampleksos proks. 540 paĝojn.

(Eldono de Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistoj Libro-Amikoj  
Budapest). .....

Ĝi pritraktas per metodoj de scienca laboro la tutan movadon ekde la naskiĝo ĝis la plej lastaj tempoj. Detala historio. Proks. 2000 biografioj. Indiko de libroj, ktp.

Prezo de la du volumoj (la unua sendota tuj post pago): broŝurite 30 fr. svis., bindite: 34 fr. svis. Aldonu 10 % por sendkostoj.

Ekzistas ankaŭ eldono sen ilustraĵoj. Prezo de ambaŭ volumoj, nur broŝurite: 18 fr. svis. plus 10 % por sendkostoj.

Mendantoj de tri ekzempleroj ricevas unu senpagan.

Havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto. (Poŝtkonto n° 326.851)

« Presejo de l' Centro », Kipdorpest, 26, Antwerpen.